




Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 30^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/hale/k98.html>

Ada Sikorska



La paĝo de Fernando Sor
Jes, mi volas esti prezidento!

La arto, kiu neniam ekzistis

N^o 98^a

Januaro 2018

Kajeroj

el la Sudo

*Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

**Calle Jabonerías, 6.3º D
30010 Murcia
Hispanio**

Enhavo

ISSN 1886-1997

ISSN 1886-1938 (se printite)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**Redaktas: **Jesuo de las Heras.**Korektas: **Jozefo Pina.**Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

| | |
|--|----|
| Redaktore: Estonto | 3 |
| Jes, mi volas esti Prezidento | 4 |
| Ada Sikorska..... | 6 |
| La peko de l' taliban'..... | 8 |
| La Faraono, ĉ. 47 ^a | 12 |
| De Tabarnia al Respubliko 3 ^a | 19 |
| La muziko de Fernando Sor..... | 22 |
| La arto, kiu neniam ekzistis | 24 |

**Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.**

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas
ties aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon
kies enhavo mistraktu nenium personon.**

Kovrilo: Ada Sikorska estis mondkonata raportistino, kiu publikigis la sendependan magazinon *Heroldo* dum 34 jaroj.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.


Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com

Tute verkita kaj kompilita per senpagaj linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer, Gimp, Scribus kaj Bluefish.



Redaktore **Estonto**

De kiam komencis nia magazino multaj aferoj okazis. Hispanio estis alia tiam, estis granda kvanto da HALEanoj, kiuj iom post iom malaperis, kelkaj pro ĉeso de vivo, aliaj pro ĉeso de fido al idealo, laŭ ordonoj de ŝafestro.

Relegante niajn unuajn numerojn, mi ne povas ne memori la eventojn, kiuj okazigis la preskaŭ malapero de la socia bazo de nia asocio. Jes, dekomence respondecas pri tio la perfido de SAT al sia propra Statuto, kiu igis ĝin fari maljustajn eksigon de HALE kiel LEA-o, kion ni neniam, tamen, agnoskis aŭ akceptis. Aldone, ni konsideras ke la spirito de SAT ne plu kuŝas tie, sed ĉe HALE, ĉar ni estas progresemaj, kaj tamen toleremaj al aliaj pensmanieroj, tiel, kiel LANTI kaj la aliaj fondintoj de SAT deziris kaj proklamis pere de sia fondanta dokumento, kiun ni memorigas al estanto kaj estonto pere de nia numero 50^a (*).

Fojfoje mi pensis ĉu indas daŭrigi la aferon redakti kaj

publikigi nian karan magazinon, **Kajeroj el la Sudo**, sed ofte venis en mian kapon la vortojn de elstara esperantisto kaj SATano de la pasinto, VALO**, kiu rekomendis, ke *oni laboru per sia fosilo*, tiel farante tiom, kiom oni povos, ne pli, sed ankaŭ ne malpli. Ankaŭ mi decidis, ke dum ĝi aperos, ĝi atestos pri tio, ke almenaŭ manpleno da homoj ne akceptas aŭ agnoskas maljustecon. Ĉu ni deziras malebligi maljustecon en la mondon? Nu, oni komencu je niaj propraj koroj kaj agoj.

Pro tio mi daŭre petas de bonvolemaj samideanoj, ke ili sendu kontribuaĵojn, novaĵojn, opiniojn, kaj tiel plu, por publikigo ĉe niaj paĝoj. Sed ĉu ili venas, ĉu ne venas, ĉu lante ĉu po malgranda kvanto, oni sciu, ke la **Kajeroj el al Sudo** plue aperos dum multaj jaroj, kiel atestanto pri tio, ke aferojn oni ĉiam povas fari pli bone, kaj ke indas pli fari ol ne fari.

Mi salutas vin ĉijare dezirante feliĉan novjaron kaj sanon por la cetero de via longa vivo.

La Redakcio

* SAT celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per kompraro de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

**Kfr. Mortis Valo, mortis amiko!, ĉe paĝo 9^a de nia numero 31^a.

Jes, mi volas esti Prezidento

Antaŭ kelkaj monato mi partoprenis simpozion en urbo rioĥa Sankta Domingo de la Calzada pri **Politiko perversigas lingvon**, fakte tre interesa kaj pensiga.

Mi trovis kelkajn dekojn da *respublikoj*, kiuj ne estas ekzakte *respublikanoj*, tio estas, partianoj de ideo, ke respubliko devas esti en Hispanio, kaj ne monarĥio, sed ili diras, ke ili aktive laboras por ke tio okazos iam. *Respublikano estas tiuj, kiuj vivas en respubliko, sed faras nenion venigi aŭ protekti ĝin*, ili asertas serioze. Nu, mi ĝojas pri la afero, ke kelkaj kuncivitanoj miaj finfine parolas pri la problemo, kaj deziras same kiel mi, ke la plej moŝtan hispanon ni ĉiuj devas elekti, kaj ne akcepti, ke li estos tia nur pro tio, ke li naskiĝis en koncerna familio. Tamen, mi metis tiklan problemon antaŭ ili ĉe manĝotablo, kaj mi ne ricevis satigan respondon...

La demando estas: **Ĉu vi pretas iĝi la Prezidento de la Respubliko, se oni pruvas al vi, ke se vi neas, ne estos respubliko?** Nu, mi konfesas, ke la demando, se oni konsideras ĝin serioze, nek estas naiva nek banala. Kaj tiam ĉies respondo estis same: *Kial mi? Ne, kompreneble ne! Mi ne kapablas...*, kaj simile. Mallonge dirite, ĉiuj deziras, ke estu respubliko en Hispanio, kondiĉe, ke alia homo akceptos la oficon. Ili eĉ asertis, ke certe venos multaj homoj, kiuj konkuros preni la postenon. Sed tiaj homoj ne validas por la ofico, laŭ mi: temas pri servo, ne pri

honoro aŭ persona avantaĝo. Oni bezonas homon, kiu deziros labori por ni ĉiuj, ne elsaltigito, kiu nur celas personan gajnon.

Bedaŭrinde ĉiuj tiaj samideanoj respondis same kiam mi ripetis la demandon en similaj renkontiĝoj, ĝis venis malsimilan respondon de virino de Alikanto: *Nu, kompreneble mi pretas, sed nur se neniu alia volos*. Ni nomu ŝin *María la Brava*. Se leganto volas scii, ankaŭ mi pretus esti prezidento, eĉ se aliaj homoj deziras tion. Ĉar certe volos prezidentiĝi homoj, kies celo estos persona gajno, same kiel la nuna politikistaro hispana. Eĉ la organizinto de tiu renkontiĝo, S-ro Antonio García-Trevijano Forte, rifuzis la eblecon, ĉar li diris, ke li *ne havas tiun ambicion, kaj la ofico estu por ni, junuloj*. Nu, ni senkulpigis S-ron Antonio, ĉar li jaraĝas 90, do *ni, junuloj* faru la taskon. Li jam sufiĉe laboris por respubliko pere de siaj libroj, elstarante inter ili lia grava **Teorio pura de la Respubliko**, kiun klarigis tiom multe al mi pri politiko nuna, pasinta kaj eble estonta de Hispanio.

Sed mi nek pardonas nek komprenas tiujn aliajn homojn, kiuj sopiras al la ideo havi respublikon en Hispanio, kaj tamen ili faras nenion venigi ĝin. Ne temas, ĉifoje, pri timo aŭ konveno pri tio, ĉu respubliko devas veni nun aŭ poste en Hispanio. Temas pri ĉu oni faros ion ajn sencan venigi ĝin. Kaj mi trovis min sola kaj sen-

konsola. Ĉar venigi respublikon ne estas voĉdoni por ke ĝi venu aŭ ne, sed agadi ebligi aferojn por ke oni povu voĉdoni tiucele.

Kelkaj homoj kunvenas fojfoje, eĉ ofte, por paroli pri la afero, sed tio ne sufiĉas. Distastigi la ideon estas bone, sed realigi ĝin estas necese. Bedaŭrinde homoj ne komprenas, ke respubliko estas maniero regi nin mem, kontroli pri kiel elspezi la monon, kiun la ŝtato deprenas el niaj poŝoj, decidi la rilaton de nia lando kun aliaj landoj, protekti la valorojn de nia kulturo laŭ tio, kion plejparto de ni decidis. Kaj sekve, se la registaro de ni **elektita** (ne simple **voĉdonita** kiel nun) perdas la fidon de ni, la popolo, ni nepre havu la manieron laŭleĝa eksoficigi ilin tuj kaj enpostenigi aliajn homojn, kiuj ne perfidos nin. Ĉar ties agoj estos nia respondeco, ankaŭ. Sed tio ne eblas nun, ĉar ni, la popolo, havas eblecon nek elekti ilin nek senpostenigi ilin. Tiun eblecon havas nun nur la politikaj partioj. Estas terure, ke hispanoj ne komprenas tion.

Tamen, oni kritikas la registaron kaj la Reĝon ĉar ili ne bone plenumas siajn devojn, kaj eble oni pravas. Sed se oni pretas fari nenion pri ĝi, oni senhavigas sin pri la rajto protesti kaj krii Tio signifas, ke ankaŭ ni ne plenumas nian devon aserti niajn rajtojn.



ANTONIO GARCÍA-TREVIJANO

Teoría Pura de la República

B el buey mudo

Diru, civitano de Hispanio, kiu legas min: ĉu vi permesas, ke oni rabados la monon de viaj impoŝtoj por fari stultaĵojn, premii homojn nur pro tio, ke iliaj ideologioj kongruas kun tiu de politikistoj en povo, kaj simile? Ĉu ne estas preferinde, ke oni fakte kaj rekte povos postuli respondecon de politikistoj, kaj ĉesigi ilin, se ili perdis la fidindecon de la popolo?

Ne ŝokus min legi, ke jes, ke vi permesas. Ĉar oni fakte tion faras, se la sola afero, kiun oni faras pri tio estas kritiki kaj kolera. Ĉar nunaj politikistoj ridaĉas al tiuj kritikoj kaj kolero, kiujn ili prifajfas, kaj fakte kalkulas kun ili. Dum oni koleros kaj

Finas en dua kolono de paĝo 6^a

Ada Sikorska



Ne tre ofte mi kopias artikolon de alia magazino, sed mi legis tiun en numero 1317 (oktobro de 2017) de la revuo *Esperanto*, organo de UEA, pri grava raportistino de la movado de Esperanto, kaj mi decidis, ke necesas, ke estas interese al ĉia esperantisto scii pri ŝi. Ĉar ne nur gravas, ke esperantistoj faru aferojn por nia lingvo, sed gravas ankaŭ, ke oni sciu pri ili. Kaj al tio, ke oni sciu, dediĉis Ada Sikorska sian vivon.

La artikolo estas subskribita de L. P., kaj diras jene:

«La esperantistoj ne forgesis Adan Sikorsan, Honoran Membrinon de UEA, unu el la plej grandaj figuroj de nia Movado, kies datreveno de morto falis la 7^{an} de la pasinta aŭgusto.

Ada famiĝis i.a. pro tio, ke ŝi transprenis de Teo Jung la tiaman sendependan gazeton *Heroldo de Esperanto* (fondita en 1920) kaj redaktis ĝin honorinde dum 34 jaroj (1962-1996) en

Venas el paĝo 5^a

kritikos, oni faros nenion. Sed se oni nek koleras nek kritikas sed aktive agas senmaskigi ilin kaj laboras por vera **reprezenteco** kaj krei sistemon kun vera **sendependeco inter la tri povoj**, finfine oni atingos la celon, kaj tiuj politikistoj nunaj devos esti en siaj denaskaj lokoj: ĉu en siaj hejmoj, ĉu en karceroj.

Sed atingi tion, ĉiuj hispanoj de ajna politika tendenco devos konfesi al si kaj publike: **Jes, mi volas esti Prezidento!**

Bruselo, Madrido kaj Torino ĝis sia morto: memorindaj estas la specialaj duoblaj aŭ trioblaj numeroj pri la universalaj kongresoj kaj pri kulturaj temoj sugestitaj de Unesko. Entute ŝi redaktis pli ol 500 numerojn. En tiu periodo Ada kun granda volstreĉo trifoje adaptiĝis al la radikalaj ŝanĝoj de la prestekniko, transiranta de frua mankompostado de la tekstoj al linotipa metodo, ĝis la nuna komputila sistemo.

La Esperanto-vivo de Ada komenciĝis en 1956, kiam en Varsovio ŝi lernis la lingvon en kurso de Julio Baghy: ŝi poste konfesis, ke ŝi ploris kiam ŝi ne povis viziti liajn lecionojn. Ŝi unue laboris en eldonejo, poste fariĝis redaktoro de la Esperanto-dissendoj de la Pola Radio kaj vicprezidentino de la Varsovia Filio de Pola Esperan-

to-Asocio; en 1959 ŝi aktivis en la gazetara laborgrupo de la 44-a UK en Varsovio. En 1960 Ada edziniĝis al la italo Gian Carlo Fighiera, konstanta kongresa sekretario de UEA, kun kiu ŝi vivis en kvar diversaj landoj. Ambaŭ interparolis dum la tuta vivo nur en Esperanto, kvankam ili konis kelkajn aliajn lingvojn. Eĉ en sia lasta hospitala lito, dum vizito de la fratino el Svislando, dekon da tagoj antaŭ la morto, ŝi rilatis kun la edzo kiel kutime en la internacia lingvo, krome kun la fratino pole, kun la bofrato, iranano, france kaj kun la kuracisto itale. La epizodo estas rakontita en la broŝuro eldonita de UEA ***La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka***.

La vivo de Ada Sikorska estis ekde la fruaj jaroj eventoplena. Ŝi naskiĝis en Siedlce (Pollando) en 1929 kaj mortis en Torino (Italio) en 1996, nur 67-jara. Pro militaj kaŭzoj, apenaŭ 11-jara, ŝi kune kun la familio kaj miliono da poloj devige elmigris al Sovetunio (kie ŝi lernis en rusaj lernejoj) kaj poste al Libano, Irano kaj Britio (kie ŝi daŭrigis la studojn en polaj lernejoj por rifuĝintoj). Rimarkinde estas, ke dum sia dummilita infana restado en Siberio (post la morto en Katyn de la patro, generalo Francisko Sikorski) ŝi sendis al onklino en Pollando kortuŝajn priskribojn pri la situacio: malsanoj, malsato kaj parazitoj. La konservitaj leteroj aperis en Esperanta traduko en ŝia broŝuro ***De tajgo al minaretoj*** (eldono Esperantotur), kiu inspiris teatraĵon, kiun en Esperantokongresoj ludis pola aktorino. Reveninte postmilite al Pollando, Ada diplomiĝis pri slava fi-

lologio kaj specialiĝis pri ĵurnalistiko.

Ekde sia lerno de Esperanto, ŝi vizitis ĉiujn universalajn kaj amason da naciaj kongresoj kaj lokaj kunvenoj. Ĉiam gaja kaj amikema al ĉiuj, neniam aroganta sed helpema al konatoj kaj nekonatoj ŝi estis: pro siaj inteligenteco kaj societema karaktero Ada ĝuis en la Movado grandan popolarecon. En la privata vivo ŝiaj fortaj energio kaj laboremo fariĝis proverbiaj. Ŝian energian karakteron konfirmas ĉies opinio, ke se ŝi dirus, ke ŝi faros ion morgaŭ, eble ŝi farus ĝin hodiaŭ. Same granda estis ŝia pasia sindediĉo al ĉiaj noblaj idealoj, ĉefe virina libereco, ekologio, helpo al la tria mondo; sen paroli pri la senfina amo al la patrolando, kiun ŝi vizitis ĉiujare.

Kiam Ada forpasis, alvenis al la edzo preskaŭ 200 kondolencaj mesaĝoj el la tuta mondo; kelkaj poetoj kiel William Auld dediĉis poemojn al la tragika evento, funebraj ceremonioj okazis en pluraj lokoj, kongresoj donis al salonoj ŝian nomon. Plej trafe, itala esperantistino skribis: "La Movado sen Ada estas kiel kongreso sen fago". Jes, la esperantistoj ne forgesis Ada.»

Se oni deziras scii pli pri Ada Sikorska, oni povas legi la libron ***La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka***, verkita de ŝia edzo, Gian Karlo Fighiera, kaj ***De tajgo al minaretoj***, verkita de Ada Sikorska mem, ambaŭ mendeblaj ĉe UEA:

<http://katalogo.uea.org>.

La peko de l' taliban' 4 La kandidato.

La venontan tagon patro venigis amikon manĝi. Li estas iomete pli juna ol li, sed ne multe. Lia nomo estas Aben' Abdala', *la filo de la servanto de Dio*, homo tre religiema, kiu neniam edziĝis pro tio, ke li kredas, ke virino estas invento de la diablo por malproksimigi viron de Dio. Ankaŭ li neniam atentis al virino dum sia tuta vivo. Li ĉeestis du aliŝtonumojn, kvankam li neniam partoprenis ilin aktive. Li kompatis vere tiujn virinojn kaj vere sindemadis ĉu vere kompatanta Dio volas tion. Sed li decidis, ke li estos for de tiu estaĵo pekigema, kiu frenezigas viron: ino.

Zorajd' servis la tablon kie sia patro manĝas kun gasto, kaj post ŝi portis la unuan pladon, Ibrahim' ordonis:

«Zorajd', montru vian vizaĝon kaj vestu pli ine por servi la duan pladon».

La gasto rigardis ŝian patron kun miro, sed diris nenion. Ili ambaŭ daŭrigis sian paroladon pri negocoj, kaj je la fino de la manĝado, dum ili du jam fumas pere de siaj cigaringoj, gastiganta Ibrahim' diris:

«Nu, Aben', kion vi opinias pri mia filino?»

«Ŝi ŝajnas modesta, beleta,

obeema... Mi ŝatas ŝin, jes. Vi estas tre bonŝanca havi filinon tian».

«Dio estas bona kun mi, jes. Min terurigas la ideo, ke ŝi iam estos kun junulaĉo kiu ne respektas niajn leĝojn, kiel tiom oftas hodiaŭ».

«Vi edzinigos ŝin al bona homo, sendube».

«Per la helpo de Di'», diris Ibrahim'.

Dum la sekvaj monatoj Aben' Abdala' ofte venis en la domon de Ibrahim', kaj alkutimiĝis vidi Zorajdon, kiu allogis lin per ŝia modesteco, prudento kaj obeemo, ĉar ŝi malkovris sian vizaĝon por servi sian patron kaj ties gaston nur kiam Ibrahim' klare ordonis tion.

Aben' estas la plej riĉa viro en la urbo, kaj li ankaŭ havis negocojn en aliaj lokoj, krom la vendejo en urbocentro, la plej granda vendejo pri tualoj kaj ekzotikaj aferoj el la tuta regiono.

Pro tio li ne miris, ke lia amiko Ibrahim' gastigis lin manĝi tiom ofte. Li volis meti sian filinon kun lin, sendube. Li ne estis malbona elekto, ĉar la fortune de Ibrahim' rangas inter la dek plej riĉaj en

la urbo, sed nun Aben' sciis, ke la filino de Ibrahim estis la plej saĝa el la tuta landoparto.

«Ĉu plaĉas al vi mia Zorajd'?», amiko Ibrahim' diris kvazaŭ li nur pensas. Ili ĵus parolis pri la politika situacio en la lando, pri popola kulturo, pri literaturo, muziko kaj pri **Sanktaj Skribaĵoj**, ĉar ili ambaŭ estis tre kulturaj kaj fervoraj. Kaj ĵus parolinte pri modesteco de virinoj, Ibrahim' glitigis la demandon kvazaŭ oni ne bezonas respondi.

«Zorajd'», murmuretis la viro kvazaŭ al si mem, «estas dolĉa, obeema, ŝi estas modesta... Kial vi havas ŝin kun burka eĉ ene de via hejmo?»

«Ŝi estas tiu, kiu insistas vesti ĝin. Fakte mi ordonas, ke ŝi ne faru, sed ŝi petas permeson ĉiun tagon por vesti ĝin. Ŝi diras, ke tiumaniere ŝi ne sentas sin strange kiam ŝi devas eliri la domon».

«Modesta, jes. Plezuro por ĉiu ajn viro. Ŝi certe havas multe da kandidatoj».

«Ne. Ŝi neniam eliras la domon, kaj kiam patrino sendas ŝin eksteren fari ion, vi jam scias kiel ŝi marŝas. Ŝiaj paŝoj estas malgrandaj kaj ŝi revenas plej eble kiel baldaŭ».

«Ĉu ŝi ĉiam agis tiel?»

«Ne. Sed antaŭ kelkaj monatoj ŝi komencis atendi min kun babuŝoj je la domenirejo kaj peti, ke mi legu al ŝi el **La Libro Sankta**. Ŝi iĝis tre fervora».

«Plaĉus al mi paroli al ŝi private, kara amiko, se tio ne ĝenas al vi».

Ibrahim' ŝajnis ekmirita. Poste li ridetis kaj leviĝis aldonante:

«Konsentite, kara amiko. Ŝi venos tuj. Miaj garantioj estu ŝia modesteco kaj via prudento».

Tuj post la eliro de la mastro de la domo, ties filino edziniĝebla aperis senburke, sed vestante modestan vestaĵon, kiu kovris ŝin de la kolo al planko.

«Ĉu vi vokis min, sinjoro?»

«Jes, Zorajd'. Sidiĝu, ĉar mi devas paroli al vi».



5 Pia parolado.

Zorajd' sidiĝis surplanke kaj aŭskutis per zorga atento.

«Mi vidas, ke vi estas modesta kaj prudenta virino. Kaj mi ŝatas tion», li diris mole. «Neniu rilato al juna Rejin'».

Zorajd' eksaltis sur sia postaĵo surgrunde. La vortoj de Aben' ektimigis ŝin multe.

«Rejin'?», diris ŝi spektante.

«Rejin', knabino, kiun mi konis antaŭlonge. Ŝia manko da modesteco kaj ŝiaj eksterlandaj kutimoj prenis sur ŝin la kolero de Dio kaj oni alŝtonumis ŝin. Ĉu vi ne memoras tion?»

Iel Aben' nun estis pli konata al ŝi, multe pli ol antaŭe. Ne nur pro tio, ke li estas ofta vizitanto de patro, sed pro tio, ke lian vizaĝon ŝi vidis antaŭ tion..., sed kie?

«ĴProelfu'..?», diris ŝi kun plenpleno da dubo.

Li ridetis. «Vi rimarkis, knabino».

«Sed vi ne ŝajnas tiun maljunulon de la dezerto, kiun mi trovis tiam».

«Ne, vi pravas. Mi ne estas

tiu. La Profeto El Futuro vizitos vin en diversaj fazoj de via vivo, virino. Via patro edzinigos vin al Aben', al kiu vi naskos gefilojn kaj kies hejmon vi regos, sed via vivo ne estos feliĉa. Tamen estas je via mano, ĉu vi plaĉos Dion, ĉu ne, virino».

Tiam la vizaĝo de Aben' tuj ombrigiĝis. Ŝi komprenis, ke Proelfu' jam estis for.

«Knabino», la viro diris, «mi serĉas edzinon, kiu donos al mi heredonton por ke li daŭrigu miajn negocojn».

Ŝi rigardadis al li kun miro. Certe Proelfu' estas impo, genio, spirita servanto de Dio, kaj li jam diris al ŝi sian mesaĝon.

«Ĉu vi estas la knabino, kiun mi serĉas?», Aben' aldonis.

«Sinjoro», diris ŝi rigardante la plankon, «tion vi devas paroli kun miaj gepatroj. Mi faros tion, kion ili kaj Dio, kiu estas ankaŭ patro mia, petos de mi».

«Ĉu vi amos min, se via patro petas tion de vi, virino?»

«Certe, sinjoro, mi faros tion. Aŭ almenaŭ mi provos. Mi malfermos mian koron al vi, sed nur se mia patro petas tion de mi».

«Multe da prudento kuŝas en

vijaj vortoj, knabino. Sed diru: kion vi faros, se vi trovas junulon kiun vi ŝatos kiam vi ne plu estos libera?»

«Sinjoro, Dio decidis, ke mi ne estas libera, nek nun nek kiam mi apartenos al tiu, kiun mia patro decidis».

Aben' ridetis kaj miris pri tiu knabino tiom juna kaj tamen tiom profunda. Vera filino de Dio.

«Iru diri al via patro, ke mi deziras paroli al li. Al li kaj al via patrino, ankaŭ».

Kiam la knabino foriris kaj ŝiaj gepatroj venis antaŭ Aben', tiu ĉi diris: : «Multe mi ŝatas vian Zorajdon, miaj geamikoj. Kiom da jaroj ŝi aĝas?»

«La venontan monaton estos dek sep jaroj, de kiam mi naskis ŝin», diris Zulem'.

«Ibrahim' Saleh', mi volas peti la manon de via filino Zorajd'. Kion respondas vi al mi?»

La demando rigardis sian edzinon, kiu ridetis plezure.

«Kion vi opinias?», li diris al ŝi.

«Edzo», ŝi respondis, «estos honoro havi Aben' Abdala' kiel filon».

«Aben'», li diris turniĝante al lia gasto, «estos honoro por ni subskribi kontrakton kun vi laŭ niaj kutimoj. Se vi ambaŭ plenumas miajn dezirojn, mi benos vian unuiĝon en la estonto».

Aben' ekhavis malagraban geston. Li esperis, ke sia amiko respondu simile al sia edzino. Sed li rimarkis, ke la homo multe amis sian filinon. «Vi estas prudenta homo, frato», li diris ekridetante. «Mi ŝatos ke vi estos, aldone, mia bopatro».

Ibrahim' plenigis glasojn per varma teo kaj ofertis unu al sia gasto kaj la alia al sia edzino. «Ni tostu», li diris, «je nia konsento».

Daŭrigota...



La Faraono [^]Ĉapitro 47^a

Nokte la gardistoj sciigis, ke la amaso de la Libianoj, petegantaj pardonon, jam eniris en la intermonton. Super la dezerto estis videbla la brilo de iliaj fajrujoj.

Ĉe la leviĝo de la suno eksonis trumpetoj kaj la tuta egipta armeo starigis kun la armiloj en la manoj, en la plej larĝa loko de la valo. Konforme al la ordono de la princo, kiu volis ankoraŭ pli forte timigi la Libianojn, inter la vicoj de la soldatoj oni starigis kvietajn portistojn, kaj inter la rajdistoj azenistojn sur azenoj. Kaj tiel en tiu tago la Egiptanoj estis multenombraj, kiel la sableroj en la dezerto, kaj la Libianoj estis teruritaj, kiel la kolomboj, super kiuj rondflugas akcipitro.

Je la naŭa horo matene antaŭ la tendo de la kronprinco haltis lia orumita milita ĉaro. La ĉevaloj, ornamitaj per strutaj flugiloj, tiel saltis, ke ĉiun devis teni du ĉevalistoj.

Ramzes' eliris el la tendo, sidiĝis en la ĉaron kaj mem prenis la kondukilojn; la lokon de la veturisto okupis ĉe lia flanko lia konsilanto, la pastro Pentuer. Unu el la generaloj malfermis super la princo grandan verdan ombrelon; ĉe la flankoj kaj post la ĉaro iris la grekaj oficiroj en orumitaj

armaĵoj. Iom malantaŭe sekvis malgranda gvardia taĉmento, kaj en ĝia mezo Tehenna, la filo de la libia ĉefo Musavasa.

Kelkcenton da paŝoj de la Egiptanoj, ĉe la eliro el la glaŭka intermonto, staris la malĝoja amaso de la Libianoj, petegantaj la pardonon de la venkinto.

Kiam Ramzes' kun sia sekvan-taro atingis la supron, kie li devis akcepti la senditojn de l' malamikoj, la armeo kriis tian honoran aklamon, ke la ruza Musavasa ankoraŭ pli ĉagre-niĝis kaj murmuretis al la libiaj ĉefoj:

— Vere, mi diras al vi, tio estas aklamado de armeo, kiu amas sian estron!...

Tiam unu el la plej ribelemaj libiaj princoj, fama bandito, diris al Musavasa:

—Ĉu vi ne pensas, ke en la nuna momento ni agos pli prudente, konfidante al la rapideco de niaj ĉevaloj, ol al la pardono de la faraona filo?... Li estas, oni diras, rabia leono, kiu eĉ karesante deŝiras la haŭton; kaj ni estas kiel ŝafidoj, forŝiritaj de la mametoj de la patrino...

—Faru, kiel vi volas —respondis Musavasa —vi havas antaŭ vi la tutan dezerton. Sed min la popolo sendis, por ke mi pagu niajn kulpojn, kaj, antaŭ ĉio, mi havas mian filon Tehennan, sur kiun la princo disverŝos sian

koleron, se mi ne sukcesos ricevi lian pardonon per miaj petegoj.

Al la amaso de la Libianoj alrajdis du Azianoj, anoncante, ke la sinjoro atendas ilian humiliĝon.

Maldolĉe eksopiris Musavasa kaj ekiris al la monteto, sur kiu staris la venkinto. Neniam antaŭe li faris tiel malfacilan vojaĝon!... Dika tolo de pentofaranto apenaŭ kovris lian dorson: lian kapon, surŝutitan per la cindro, senkompate bruligis la suno; la nudajn piedojn mordis la akra sablo, kaj la koron premegis la malĝojo de li mem kaj de la venkita popolo.

Li faris apenaŭ kelkcenton da paŝoj, sed li devis kelkfoje halti kaj ripozi. Ofte li devis sin turni posten, por kontroli, ĉu la sklavoj, portantaj la donacojn por la princo, ne ŝtelas orajn ringojn aŭ juvelojn. Musavasa, kiel homo sperta, sciis, ke oni plej volonte profitas la fremdan malfeliĉon.

La ruza barbaro tiel konsolis sin en sia malfeliĉo:

"Mi dankas la diojn, ke la sorto destinis al mi humiliĝi antaŭ la princo, kiu baldaŭ, tre baldaŭ surmetos la faraonan ĉapon. La monarĥoj de Egipto estas grandanimaj, precipe en la horo de la venko. Se do mi sukcesos kortuŝi mian sinjoron, li plifortigos mian povon en Libio kaj permesos

al mi preni grandajn impostojn. Vera miraklo estas, ke la princo mem kaptis Teĥennan; ne nur li ne estos maljusta al li, sed eĉ li superŝutos lin per honoroj..."

Tiel li pensis kaj senĉese sin turnis posten. Sklavo, eĉ nuda, povas kaŝi la ŝtelitan juvelon en la buŝon, eĉ engluti.

Tridek paŝojn antaŭ la ĉaro de la kronprinco, Musavasa kaj akompanantaj lin la plej eminentaj Libianoj falis sur la ventrojn kaj kuŝis en la sablo, ĝis la princa adjutanto ordonis al ili leviĝi. Proksimiĝinte kelke da paŝoj, ili ree falis sur la ventrojn, kaj ripetis la samon trifoje, kaj ĉiufoje Ramsez' devis ordoni al ili leviĝi.

Dume Pentuer, staranta sur la princa ĉaro, murmuretis al sia sinjoro:

—Via vizaĝo montru al ili nek severecon, nek ĝojon. Prefere estu trankvila, kiel la dio Amon, kiu malestimas siajn malamikojn kaj ne ĝojas pro malgravaj triumfoj...

Fine la pentofarantaj Libianoj haltis antaŭ la princo, kiu de la ĉaro rigardis ilin, kiel severa hipopotamo anasidojn, kiuj nenien povas sin kaŝi de ĝia forto.

—Vi —subite diris Ramsez' —vi estas la saĝa libia ĉefo, Musavasa?

—Mi estas via servisto

—repondis la demandito kaj ree falis sur la ventron.

Oni ordonis al li leviĝi, kaj la princo daŭrigis:

—Kiel vi povis tiel peki kaj levi la manon kontraŭ la tero de l' dioj? Ĉu forlasis vin la antaŭa prudento?

—Sinjoro! —respondis la ruza Libiano —la ĉagreno malklarigis la prudenton de la elpelitaj soldatoj de lia sankteco, ili do kuris al sia propra pereco kaj altiris ankaŭ min kun la miaj. La dioj scias, kiel longe daŭrus ĉi tiu malbela milito, se en la fronto de la armeo de l' eterne vivanta faraono ne stariĝus Amon mem. Kiel ventego de la dezerto vi falis, kien oni ne atendis vin; kaj kiel la bovo rompas kanon tiel vi frakasis la blindigitan malamikon. Tiam ĉiuj niaj popoloj prenis, ke eĉ la teruraj libiaj regimentoj nur tiam ion valoras, kiam ĵetas ilin via mano.

—Vi saĝe parolas, Musavasa —diris la princo —kaj ankoraŭ pli saĝe vi faris, ke vi iris renkonte al la armeo de la dia faraono, kaj ne atendis, ĝis ĝi venos al vi. Tamen mi dezirus scii, kiom estas vera via humileco?

—Serenigu vian vizaĝon, granda egipta potenculo [Surskribo sur la tomba monumento de l' faraono Horem-hepa, de la jaro 1470 antaŭ Kristo] —respondis

Musavasa, —Ni venas al vi kiel subuloj, por ke via nomo estu granda en Libio kaj por ke vi estu nia suno, kiel vi estas la suno de naŭ popoloj. Ordonu nur al viaj regantoj, ke ili estu justaj por la popolo venkita kaj aligita al via potenco. Administru nin viaj ĉefoj konscience juste, ne laŭ sia malbona volo, malvere raportante pri ni kaj vekante vian malfavoron kontraŭ ni kaj niaj infanoj. Ordonu al ili, vicreĝo de la bonkora faraono, ke ili regu nin laŭ via volo; konservante la liberon, havon, lingvon kaj morojn de niaj patroj kaj antaŭuloj.

Estu viaj leĝoj egalaj por ĉiuj viaj popoloj, viaj oficistoj ne indulgu unujn, kaj ne estu tro severaj por aliaj. Egalaj por ĉiuj estu verdiktoj. Ili kolektu impostojn, destinitajn por viaj bezonoj kaj via uzo, sed ili ne postulu aliajn, sekrete de vi, kiuj ne eniros en vian trezorejon, sed riĉigos nur viajn servistojn kaj la servistojn de viaj serivistoj. Ordonu regi nin sen maljustaĵoj por ni kaj por niaj infanoj, vi ja estas nia dio kaj estro por ĉiam. Imitu la sunon, kiu al ĉiuj dissendas sian brilon, donantan la forton kaj vivon. Ni petegas viajn favorojn, ni viaj libiaj subuloj, kaj ni falas sur la vizaĝon antaŭ vi, la heredonto de la granda kaj potenca faraono.

Tiel parolis la ruza libia princo

kaj fininte ree falis sur la ventron. Kiam la kronprinco aŭskultis la saĝajn vortojn, liaj okuloj brilis, larĝiĝis liaj naztruoĵoj, kiel ĉe ĉevaloviro, kiu sate sin paŝtinte, enkuras sur la herbejon inter la ĉevalinojn.

—Leviĝu, Musavasa —diris la princo —kaj aŭskultu, kion mi diros al vi. La sorto via kaj de viaj popoloj ne dependas de mi, sed de la grandanima sinjoro, kiu leviĝas super ni, kiel la ĉielo super la tero. Mi do konsilas al vi, ke vi kaj la libiaj ĉefoj iru Memfison kaj falinte tie sur la vizaĝon antaŭ la estro kaj dio de ĉi tiu mondo, ripetu la humilajn vortojn, kiujn mi aŭdis ĉi tie. Mi ne scias, kia estos la rezultato de viaj petoj; sed ĉar la dioj neniam deturnas sin de la humilaj kaj petegantaj, mi antaŭsentas, ke vi ne estos malbone akceptitaj. Kaj nun montru al mi la donacojn, destinitajn por lia sankteco, por ke mi juĝu, ĉu ili tuŝos la koron de lia sankteco.

En ĉi tiu momento Mentezufis faris signon al Pentuer, kiu staris sur la ĉaro de la princo. Kiam Pentuer proksimiĝis al la sankta viro, Mentezufis diris:

—Mi timas, ke la triumfo tro fierigos la junan sinjoron. Ĉu vi ne pensas, ke estus prudente interrompi iel la solenon?...

—Kontraŭe —respondis Pentuer —ne interrompu la sole-

non, kaj mi certigas al vi, ke dum la triumfo la princo ne havos ĝojan mienon.

—Ĉu vi faros miraklon?

—Ĉu mi povus? Mi nur montrus al li, ke en ĉi tiu mondo grandan ĝojon akompanas grandaj ĉagrenoj.

—Faru, kiel vi volas —respondis Mentezufis —ĉar la dioj donacis al vi saĝon, indan de la membro de la plej alta kolegio.

Eksonis trumpetoj kaj tamburoj kaj oni komencis la triumfan marŝon.

En la fronto paŝis nudaj sklavoj kun la donacoj, kondukataj de eminentaj Libianoj. Oni portis orajn kaj arĝentajn diojn, skatolojn kun parfumoj, emajlitajn vazojn, teksaĵojn, meblojn, fine orajn pladojn, ŝarĝitajn per rubenoj, safiroj kaj smeraldoj. La sklavoj, portantaj ilin, havis razitajn kapojn kaj buŝojn, ligitajn per tukoj, por ke iu ne ŝtelu multekostan juvelon.

La princo Ramsez' apogis ambaŭ manojn sur la rando de la ĉaro kaj de la supro de la monteto rigardis la Libianojn kaj sian armeon, kiel flavkapa aglo grizajn perdrikojn. La fiero plenigis lin de la piedoj ĝis la kapo, kaj ĉiuj sentis, ke oni ne povas esti pli potenca, ol ĉi tiu venka ĉefo.

Subite la okuloj de l' kronprinco perdis sian brilon

kaj sur lia vizaĝo estis videbla dolora surprizo; la staranta post li Pentuer murmuretis:

—Klinu, sinjoro, vian orelon... De l' tempo, kiam vi forlasis la urbon Pi-Bast, tie okazis strangaj aferoj... Via virino, la Fenicianino forkuris kun la Greko, Likono...

—Kun Likono?... —ripetis la princo.

—Ne moviĝu, sinjoro, kaj ne montru al viaj sklavoj, ke vi havas malĝojon en la tago de l' triumfo...

En la sama momento preterpasis ĉe la piedoj de la princo longa vico de Libianoj, portantaj en korboj fruktojn kaj panon, kaj en grandegaj kruĉoj vinon kaj oleon por la armeo. Ĉe tia vido inter la disciplinitaj soldatoj eksonis ĝoja murmuro, sed Ramsez' ne rimarkis tion, okupita per la rakonto de Pentuer.

—La dioj —murmuretis la profeto —punis la perfidan Fenicianinon...

—Ĉu ŝi estas kaptita?... —demandis la princo.

—Jes, sed oni devis sendi ŝin en la orientajn koloniojn... ĉar la pesto tuŝis ŝin...

—Ho dioj!... —murmuretis Ramsez'. —Ĉu ĝi ne minacas min?...

—Estu trankvila, sinjoro: se vi estus infektita, vi jam estus malsana...

La princo eksentis malvarmon en ĉiuj membroj. Kiel facile estas por la dioj forpuŝi homon de la plej altaj suproj en la senfundaĵon de plej granda mizero!...

—Kaj la krimulo Likon?...

—Jes, li estas granda krimulo —diris Pentuer —ne multaj tiaj ekzistas sur la tero...

—Mi konas lin. Li estas simila al mi, kiel bildo en la spegulo... respondis Ramsez'.

Nun venis aro da Libianoj, kondukantaj strangajn bestojn. En la komenco paŝis unuĝiba kamelo kun blankaj haroj, unu el la unuaj kiujn oni kaptis en la dezerto. Post ĝi du rinoceroj, aro da ĉevaloj kaj malsovaĝa leono en kaĝo. Poste multe da kaĝoj kun diverskoloraj birdoj, simioj kaj malgrandaj hundoj, destinitaj por la kortegaj sinjorinoj. En la fino oni pelis grandajn arojn da bovoj kaj ŝafoj, por liveri viandon al la soldatoj.

La princo apenaŭ ĵetis rigardon sur ĉi tiun migrantan bestojon kaj demandis la pastron:

—Kaj Likon estas kaptita?...

—Nun mi diros al vi la plej malbonan novaĵon, malfeliĉa sinjoro —murmuretis Pentuer. —Sed memoru, ke la malamikoj de Egipto ne devas rimarki en vi malĝojon...

La princo faris movon.

—Via dua virino, la Hebreino Sara...

—Ĉu ankaŭ ŝi forkuris?...

—Ŝi mortis en malliberejo...

—Ho dioj!... Kiu kuraĝis ĵeti ŝin tien?...

—Ŝi mem kulpigis sin pri la mortigo de via filo...

—Kio?...

Granda krio eksonis ĉe la piedoj de la princo: preterpasis la libiaj kaptitoj, kaj en ilia fronto la malgaja Teĥenna.

Ramsez' havis nun la koron tiel plenigitan de doloro, ke li faris signon al Teĥenna kaj diris:

—Stariĝu apud via patro Musavasa, por ke li vidu vin kaj konvinkiĝu, ke vi vivas...

Ĉe ĉi tiuj vortoj ĉiuj Libianoj kaj la tuta armeo kriis potencan aklamon; sed la princo ne aŭskultis ĝin.

—Mia filo ne vivas?...

—demandis li la pastron.

—Sara kulpigis sin pri la mortigo de la infano?... Ĉu frenezo falis sur ŝian animon?...

—La infanon mortigis la mizera Likon...

—Ho dioj, donu al mi fortojn!... —ĝemis la princo.

—Ekregu vin, sinjoro, kiel konvenas al venka militestro...

—Ĉu eble estas imagi tian

doloron!... Ho senkompataj dioj!...

—La infanon mortigis Likon, Sara sin kulpigis, por savi vin... Vidante la krimulon nokte, ŝi pensis, ke tio estis vi mem...

—Kaj mi elpelis ŝin el mia domo!... Kaj mi faris ŝin servistino de l' Fenicianino!...

—murmuretis la princo.

Nun aperis egiptaj soldatoj, portantaj korbojn, plenajn de brakoj, detranĉitaj al la mortigitaj Libianoj.

Vidante tion, Ramsez' kovris sian vizaĝon kaj maldolĉe ekploris.

Tuj la generaloj ĉirkaŭis la ĉaron, konsolante la sinjoron. La sankta profeto Mentezufis faris proponon, kiun oni akceptis senprokraste, ke de tiu tempo la egipta armeo neniam plu detranĉu la brakojn al la malamikoj, falintaj sur la batalkampoj.

Per ĉi tiu neatendata okazo estis finita la unua triumfo de la egipta kronprinco. Sed la larmoj, kiujn li verŝis sur la detranĉitajn brakojn, pli forte ol la venka batalo ligis la Libianojn al lia persono. Kaj tial neniu miris, ke ĉirkaŭ la fajrujoj pace sidiĝis la egiptaj kaj libiaj soldatoj, dividante la panon kaj trinkante el la samaj pokaloj. La militon kaj malamamon, kiuj devis daŭri tutajn jarojn, anstataŭis

profunda sento de trankvilo kaj konfido.

Ramsez' ordonis, ke Musavasa kaj la plej eminentaj Libianoj tuj veturu Memfison kaj donis al ili eskorton, ne tiom por gardi ilin, kiom por la sendanĝereco de iliaj personoj kaj de la multekostaj donacoj. Li mem kaŝis sin en la tendon kaj ne montris sin dum kelke da horoj. Li ne akceptis eĉ Tutmozison, kiel homo, por kiu la doloro estas plej bona kunulo.

Vespere venis al la princo deligitaro de grekaj oficiroj, sub la komando de Kalipos. Kiam la kronprinco demandis, kion ili deziras, Kalipos respondis:

—Ni venis petegi vin, sinjoro, ke la kadavro de via servisto kaj nia ĉefo, Patroklo, ne estu transdonita al la egiptaj pastroj, sed bruligata, laŭ la greka moro.

La princo ekmiris.

—Vi sendube scias, mi pensas —diris li —ke el la korpo de Patroklo la pastroj volas fari mumon de la unua klaso kaj meti ĝin en la faraonaj tomboj. Ĉu ekzistas por homo pli granda honoro en ĉi tiu mondo?

La Grekoj ŝanceliĝis, fine Kalipos, kolektinte la tutan sian kuraĝon, respondis:

—Nia sinjoro, permesu al ni malkovri niajn korojn antaŭ vi. Ni bone scias, ke pli profita estas por homo fariĝi mumo, ol esti bruligita: la animo de la bruligita transiras tuj en la landojn de la eterneco, la animo de la mumo povas milojn da jaroj vivi sur la tero kaj ĝui ĝian belecon. Sed la egiptaj pastroj malamis Patroklon (tio ne ofendu viajn orelojn!). Kiu do garantios al ni, ke farinte lian mumon, ili ne haltigos lian animon sur la tero sole por turmenti ĝin?... Kaj kion ni valorus, se suspektante venĝon, ni ne gardus de ĝi nian samlandanon kaj ĉefon?...

La miro de Ramsez' ankoraŭ pligrandiĝis.

—Faru —diris li —kion vi opinios necesa.

—Kaj se oni ne donos al ni la korpon?...

—Preparu la lignaron, mi mem zorgos pri la resto.

La Grekoj eliris, la princo alvokis Mentezufison.



Hatshepsut, faraonino.

De Tabarnia al Respubliko 3^a

Cu Tabarnia? Jes, tio ja povus esti solvo por la problemo kataluna hodiaŭa, sed eble ĝi ankaŭ estos alia problemo: riĉa Katalunio forlasas la malriĉan (Ĝironon, Leridon, kaj la malriĉajn partojn de ka Taragono kaj Barse-lono). Kaj jen la mispaŝo de sendependistoj: malsolida reco. Jes, mi vidas la kernon de la problemo: se oni ne plenas sin hispana, kial diable oni devas senti sin kataluna? Sed solidareco postulas, ke ne nur kataluna, sed oni nepre sentu sin hispana, kaj helpu aliajn homojn loĝantajn en aliaj partoj de nia lando. Sed se Tabarnia ekekestas, eble en la ostempo ĝi sukcesos sendependiĝi kaj el Katalunio kaj el Hispanio.

Mi ne povas ne pensi pri simileco inter Kroatio kaj Katalunio, senrigardante la koncernajn historiojn, kiuj ne taŭgas pridiskuti nun ĉi tie, mi koncentriĝos pri iliaj deklarioj pri sendependeco kaj ties konsideroj fare de aliaj landoj: kiam la unua proklamis sian sendependecon, Germanio tuj reagis akceptante tion. Kiam Katalunio proklamis sian sendependecon, Germanio reagis tuj

malakceptante tion. En la unua kazo, la ceteraj landoj de Eŭropo malaprobis la rapidecon per kiu Germanio reagis, sed tamen ili akceptis same. En la dua kazo oni ne malaprobis la germanan movon, kaj simile ili sekvis ĝin. Ili ne povas maltrafi la konsideron, ke la lando kiu malvenkis la domiliton finfine venregon de Eŭropo.



eveninte al kataluna i trovas, ke sendependiĝo ne eblas se oni ne havas armeon fortan kaj grandan kvanton de mono por subteni la novan respublikon. Al mi la ideo pri respubliko estas tre kara, sed oni devas kompreni kaj eĉ pristudi la kaŭzojn pro kiuj la du hispanaj respublikoj fiaskis. Mi trovas, ke neniu el ili sukcesis identigi kaj solvi la verajn problemojn, kiujn Hispanio havis tiutempe. La unua interesiĝis pri regionaj identecoj, kaj pro tio ili perdis la ŝancon okupiĝi pri tio, kio ankoraŭ restis de la Hispana Imperio: Kubo, Filipinoj, kaj Porto Riko, fortigante ilin tiel ke Usono ne sukcesis tie, kie angloj malsukcesis dum jarcentoj: tiuj landoj neniam balotis por sendependiĝo, sed estis okupataj de imperiisma Usono kiel fino de milito, kies kaŭzo baziĝis sur mensogo. Se la tiama hispana registaro klopodintus subteni necesan ar-

meon kaj surteran kaj surmaran, Usono ne venkintus tiun maljustan militon dudek du jarojn post nia Unua Respubliko, kaj eble pro okupiĝo de hispanaj aferoj anstataŭ ideologiaj fantazioj, la respubliko daŭrigintus multe pli longe, sed ĝi lasis grandajn problemojn al revenontaj reĝoj Alfonso la 12^a kaj ties vidvino, kiu regis nome de sia filo Alfonso la 13^a, kiuj ankaŭ ne sciis trakti la prolemon. Sed tiuj tri landoj, Filipinoj, Kubo kaj Portoriko ankoraŭ povus esti hispanaj provincoj, aŭ eble sendependaj nacioj, sed per malpli traumaj rimedoj.

La Dua Respubliko hispana ne havis imperion perdi, sed ĝi perdis ĵurŝtaton nome de bastarda, alilanda revolucio, kiu perdis nacian suverenecon favore al Sovetunio: ekzistas fotoj montrante revoluciulon forstrekante la frazon surmuran *¡Viva España!* (vivu Hispanio!) kaj



anstataŭante ĝin per *¡Viva Rusia!* (vivu Rusio!) Ankaŭ estis tiutempe en Hispanio politikaj komisaroj el Sovetunio, kiuj viglis pri tio, ke la revoluciajn gvidliniojn (diktate de Stalino, kompreneble) oni obeos. Pro tio ili malvenkis la militon, rajtigante la mala-

mikon nomi sin *naciuloj*.

Respublikanoj hodiaŭ devas esti pli inteligentaj, kaj ne povas ignori nian tradicion, nian historion, aŭ nian manieron esti. Oni ne povas enporti perforte kutimojn kaj pensmanierojn el eksterlando. Hispanio ja havas valorajn alportojn al cetera mondo. Fakte ni jam alportis multe da bonaj aferoj en Mezepoko kaj komenco de Moderna Aĝo: Ameriko estas kreitaĵo hispana kaj politike kaj religie, kvankam la angloj klopodis ruinigi kaj Amerikon (atako al Kargaĥeno de Indias) kaj Eŭropon (per sia politiko pri *balanco de povoj*).

En Hispanio diversaj kulturoj kombiniĝis en unikan rezulton. Oni multe parolis pri la islama heredaĵo, neforgesante la *romianan popolbazon*, sed tute neglektante la vizigotan kontribuon: sendependiĝo el imperio, tiel kreante novan. Ĉar en Leovigildo kaj ne en Abderramano, estas la origino de Hispanio. La unua estis unuiginto de sendependa Hispanio, kaj la dua estis rifuĝinto, kiu kreis nenion krom neadon pri tio, kio li vere estis: islamano obeanta la deziron de l' profeto, kiu postulis unuiĝon kaj religian kaj politikan.

Sed visigotoj ne multe da tempo regis Hispanion, de 410 ĝis 711, sed tiuj jarcentoj estis gravaj por nia historio. Ili venigis al ni la ideon nacian sendependiĝon por la unua fojo en nia

historio. Antaŭ ili kaj la romianoj en nia lando vivis multaj triboj diversaj, kiuj neniam pensis pri si kiel unuiĝinta popolo. Eĉ romianoj ne unuigis Hispanion, sed ili dividis ĝin en du partojn: *Hispania Ulterior* (tio estis malproksima Hispanio), kaj *Hispania Citerior* (Hispanio de ĉi tie). Sed Visigotoj konkeris la tuton, kaj similigis diversajn tribojn kaj popolojn en unu solan, tiel ke kiam venis muslimoj, ili devis batali kontraŭ nur unu popolo, kaj se ne estus perfidon de Grafo Don Ĥuljan' la militon venkintus visigotoj, kaj nia historio estintus tre diversa.

Tuj post sia invado, visigotoj komprenis, ke unuiĝo fortigas la nacion, kaj ili uzis religion por sukcesi fari tion. Pere de la Koncilioj de Toledo, visigotaj reĝoj unuigis la landon, kvankam la povoj kaj civila kaj religia ofte konfliktis, ĝis kiam Filipo la 2^a decidis preni la ĉefurbon al preskaŭ najbara vilaĝo Madrido je 1561.

Dum la islama okupado evidentiĝis, ke Hispanio Islama estis grava en la mondo dum ĝi estis unuiĝinta, Kiam la unua Emiro de politike sendependa islama Hispanio mortis, Abdelrahmano I^a, je 788, li lasis gravan kaj fortan nacion. Tia ĝi restis ĝis la morto de Almanŝuro, je 1002, kiam la forta islama nacio, kiu dum jarcentoj okupis la landon, komencis dividiĝi po tajfoj, kies nombro kreskis ĝis 26. Tial la kristanaj

reĝoj povis rekonkeri la landon, ĝis kiam je 1492 la famaj Gereĝoj Katolikaj forpuŝis la lastan islaman reĝon, Boabdil, el nia loko.

Sed en nuna Hispanio ŝajnas, ke oni ne lernis la lecionon ankoraŭ, kaj dum oni konsideras bone esti *avangarda* per uzo de malplenaj vortoj, oni konsideras eksmodaj niajn tradicion kaj religion, respekton al pliaĝuloj, kaj similajn valorojn kaj principojn. Eble pro ignoranteco, eble pro fieco, ili ne konsideras, ke nuligi tradicion havas grandan koszon. Tio okazis al ambaŭ niaj du respublikoj, kaj tiu paspago ankaŭ minacas enkaŝiĝi denove al nuna Hispanio. Ne, Katalunio ne iĝos sendependa ĉar tradicio postulas grandan paspagon, kaj ni ne pretas pagi tion, kaj malpli eble katalunoj, kiel pruvas la koncepto mem pri Tabarnio, kiuj la civitanoj de Barselono kaj kelkaj aliaj gravaj urboj de Katalunio ekstarigis laste. Nune pli ol tri mil entreprenoj lasis Katalunion, kaj eble aliaj foriros ankaŭ, se Tabarnio ne allogas ilin sufiĉe frue, ĉar tiuj, kiuj jam foriris ne emas reveni... Nun la du perdintaj partioj en la lasta baloto penas formi registaron por persekuti siajn eksmodajn ideojn, forgesante, ke sendependiĝo okazas kiam oni havas fortan armeon kaj multe da mono pagi ĝin, sed sendependistoj havas nek unun nek la alian.

Sed ni ne estu senesperaj: ni ja bezonas respublikon. Ni lernu respekti alilpensulojn kaj tradicion, kaj ni konstruu tion, kion ni bezonas, kaj la respublika afero progresos dece kaj satige por ĉiuj. Pacon ni konstruu ne perforte, sed kompreneme kaj integrigeme. Pro tio ni ĉiuj laboru por ke ni ĉiuj donos nian Trian

Respublikon longa vivo. Vivu Respubliko! For tiuj politikistoj kaj partioj, kiuj forprenas la suverenecon el popolo! Vivu la afero de ni ĉiuj, respublikoj!



REPÚBLICA ESPAÑOLA

La muziko de Fernando Sor

Antaŭ pli 20 jaroj mi ankoraŭ okupiĝis pri gitaro klasika, alidirite *hispana* eble pro tio, ke niaj praavoj estis tiom fremdaj al eksterlando (eble prave, sed tio ni pridiskutos alian tagon), ke ili kredis, ke nian muzikilon oni ne konis ekster niaj limoj, kaj sekve ili ne konis la bonegan muzikon, kiun por ĝi verkis genioj kiel Maŭro Giuliani, Francesco Corbetta, J. H. Kaspberger, Charles Doisy kaj aliaj indaj muzikistoj.



Tamen, en konstelacio de gitaristoj neniu tiom brtila kiel francohispano **Fernando Sor y Muntada**. Mi konis lian muzikon, kiam mi studis en konservatorio, kaj scivola pri lia **tuta muziko**, mi trovis la ses dek kvar juvelojn, kiujn li komponis dum tuta sia vivo, en Hispanio kaj Francio.

Mi kompilis preskaŭ ĉiujn muzikaĵojn de Fernando Sor (fakte nur tri mankas ankoraŭ) kaj publikigis ilin pere de mia retpaĝo, per MIDI formato pere de programoj **Mozart** kaj **TableEdit**. Bedaŭrinde, la modernaj komputiloj kutime ne plu uzas tiun formaton, kaj sekvante afablan konsilon de amiko, mi *tradukis* la tutan verkaron de Fernando Sor al pli nova, ĝenerale uzata MP3, eĉ se ĝi estas multe pli peza, kiŝ signifas, ke la muzikarĥivoj estas multe pli grandaj. Tamen tio ne plu gravas pro la pli granda rapideco de hodiaŭaj retkonektiloj.

Nun oni povas denove ĝui la muzikon de mia paĝo pri Fernando Sor ĉe ĉi tiu adreso:

<http://www.gazetoteko.com/sor>

Bonan aŭskultadon kaj legadon!

Jesuo

Venas el lasta paĝo unua
parolas


pere de melodio, kaj la
dua pere de la korpo de
la artistoj.

Ĉe ĉia ajn filmo oni
trovas spurojn de la ses
artoj, kvankam la bazo
estas, kompreneble, pa-
rolo (poezio) kaj la ra-
konto okazas ie (arĥi-
tekturo); kaj la aliaj artoj
venas kun la tuto,
evidente. Sed kion
aldonis kino al arto,
vere? Laŭ mi, nenion pli
ol kunigi la aliajn ses en
unu solan artaĵon. Pro
tio kina arto estas
miksrasa, bastarda arto
multekolora, nenio pli.

Kaj jen la beleco de
kino, laŭ mi. Se oni vidas
filmojn kiel *La kvina
elemento* aŭ La seriojn
Star Wars aŭ *Indiana
Jones*, kune kun
mirindajn imagojn

(pentroarton) oni trovas
ankau diversajn lokojn (arĥitekturon)
kun homojn moviĝantajn tie kaj reen (dancado) kun certa ritmo kiuj
parolas kun diversaj tonoj kaj ritmoj (muziko) pere de formalaj aŭ
implicitaj dialogoj kaj priskriboj (poezio), kaj ni venas en la
konkludon, ke filmoj ne estas arto per ili mem, sed ili ĉiuj inkluzivas
(aŭ almenaŭ provas tion fari ili) la ses artojn kune. Pro tio, eĉ se ne
estas sepa arto, estas vera atingo kunligi ilin ses en ununuran
pecon da arto.

Kaj aldone al la sensencaĵo, en la hispana lingvo la vorto prenas
malĝustan ĝenron: "El séptimo arte" devas esti "**La séptima arte**",
ĉar tiun kakofonion en *La arte* evitas la virĝenra artikolo "el" en "El
arte", sed la ordinala nombro inter artikolo solvos tiun neagrablan
sonon pere de la korekta artikolo, "la".





Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels98.pdf>

Kulturo

La arto, kiu neniam ekzistis

Kina muziko, oni diras, estas malfacile verki, ĉar ĝi devas provizi la markon por la sentoj de la roluloj kaj sekve de la spektantaro, ankaŭ, laŭ la progreso de la rakonto.

Kompreneble, estas multe da rubo en sonbendoj de filmoj, sed estas ankaŭ multe da fajna muziko. Ni pensu pri **2001, odiseo en spaco**, ekzemple. Ne estas originala muziko tie, sed per tiu filmo oni povas aŭdi Beethovenon, ambaŭ Straŭsojn (Johanon kaj Rikardon), Kaĉaturjanon kaj eĉ Georgon Ligeti, kiel parton de bonkvalita muziko mirinda. Sed se oni konsideras filmojn kiel **La violonisto sur la tegmento**, tiu ĉefverko muzika kun imagoj kaj rakonto aldonaj, kiu Jeri Bock regalis nin je 1964, aŭ A. L. Veber je 1973 pere de sia **Jesuo Kristo Superstelula**, oni trovas, ke muziko estas tiel grava kiel la rakonto mem, almenaŭ.

Tamen, estas multaj aliaj filmoj kies muziko ne ĉefrolas ekzakte, kiel **La sono de muziko**, muzikita de Rikardo Rodgers kaj Oskar'

Hammerstein kaj kantita de Julie Andrews kaj Kristoforo Plummer, inter aliaj, sed eĉ tiel tiujn filmojn oni ne komprenas se muziko estus forprenita de ili.

Vere, tamen, muziko ne estas la unika kontribuanto al bona filmoj. Oni diras vaste, ke *kino estas la sepa arto*, kaj mi trovas tiun diraĵon absurda kaj troiga, ĉar je mia kono, filmoj estas nur negoco kaj montrado, alidirekte, **maŝino fari monon** per allogi la intereson de publiko. Male, estas nur ses artoj, aŭ, se oni deziras esti strikta, nur du: **arĥitekturo** kaj **poezio**. Veras, ke el ĉiuj du elfontas aliaj du artoj: **skulptarto** kaj **pentra-arto**, kiuj plibeligas nian rifuĝejon el patrinnaturo, kiam ni jam fartas sekure en ĝi, kaj komencas diri rakontojn, kiuj komenciĝis versaj, rimaj kaj ritmaj, sed kiuj post nelonge perdis tiajn trajtojn (tial, ke ne ĉiuj kapablas krei ilin) kaj tial la normala literatura arto venis el ĝi. Sed ritmo kaj sono mem permesis al artistoj krei aliajn du artojn, kiuj venas el poezio: **muziko** kaj **danco**. Pro tio, ke la

Finas en antaŭa paĝo

ISSN 1886-1938 (printita)

ISSN 1886-1997

Depósito legal: Z-2398-88